# Sinonimaro - Enkonduko

El La bona lingvo

- reiru al Sinonimaro

---

Iru al la Listo.

*Anna Löwenstein*

Mi komencis krei la sinonimaron kiam mi tradukis mian propran romanon *La ŝtona urbo* en Esperanton, kaj daŭrigis ĝin tradukante mian duan romanon *Morto de artisto*. Mi enkhavis la ideon, kiam mi konstante devis serĉi sinonimojn por bazaj konceptoj kiaj "bela", "iri" aŭ "homamaso". Baldaŭ venis al mi la penso, ke ne havas sencon ĉiufoje rekomenci la serĉon por la samaj vortoj, kaj ke estus utile noti tiujn sinonimojn en kartindekso.

Unue mi faris la sinonimaron nur por mi mem, sed baldaŭ mi konstatis, ke multaj verkistoj povus trovi ĝin utila. Tial mi pli celkonscie ampleksigis ĝin, kreante novan karton ĉiufoje kiam mi serĉis sinonimon por ne jam traktita vorto. Mi tamen neniel povas pretendi, ke ĝi estas kompleta; uzantoj tuj konstatos, ke amaso da bazaj konceptoj ankoraŭ mankas. Tio ŝuldiĝis al la situacio en kiu mi kreis ĝin; ne temis pri sistema laboro, sed pri hazarda sistemo, surbaze de la vortoj, kiujn mi bezonis en difinita momento.

Tiu aliro, kvankam ne sistema, havis la avantaĝon, ke temis pri vera bezono en vera kunteksto. Tial mi ofte venis al solvoj, pri kiuj mi eble ne pensus se mi ne elpensus ilin en la kunteksto de reala bezono.

Por kio utilas sinonimaro? Unue kaj plej evidente, ĝi sugestas alternativojn por eviti troan ripetadon de la sama vorto. Sed sinonimaro havas multe pli gravan funkcion. Ĝi donas ideojn al aŭtoro, kiu serĉas la precizan nuancon, kiu perfekte redonas la ideon aŭ emocion, kiun ŝi deziras transdoni al siaj legantoj. Kaj tio estas la beleco de Esperanto: trakribrante amason da proponoj oni finfine trafas ĝuste tiun, kiu transdonas la deziratan ideon – aŭ kiu eventuale donas ideon por nova kunmetaĵo, ankoraŭ pli trafa.

La sinonomaro ne nur estas nekompleta; ĝi estas ankoraŭ neordigita. Mi komencis fari tion nur en la unuaj paĝoj. Oni rimarkos, ke sub la kapvortoj *bona* aŭ *bela*, ekzemple, estas sufiĉe plena listo da proponoj, sed ke post la kapvortoj komenciĝantaj per C la rikolto fariĝas malpli riĉa. Ĝis nun mi sukcesis enordigi nur la literojn A-C kaj parton de la *mal*-vortoj. Preskaŭ ĉiuj kapvortoj post tiu punkto havas la indikon (P); tio signifas "Prilaborota", alivorte ke la listo bezonas ne nur kompletigon sed ankaŭ reordigadon. Kie troviĝas tiu indiko la proponoj estas listigitaj nesisteme, laŭ la vicordo en kiu ili hazarde eniris mian kapon. Sub la jam pritraktitaj kapvortoj mi provis ordigi ilin iom pli sisteme, grupigante la sinonimojn pli-malpli laŭ signifo.

Kelkaj el la sinonimoj povus ŝajni strangaj; ĉu ekzemple oni povas konsideri "ofendema" sinonimo por "aroganta"? Ne nepre, kompreneble, sed povus troviĝi difinita kunteksto, en kiu verkisto trovas tion la perfekta vorto. Kie la kapvortoj estas ordigitaj – alivorte, kie ne plu troviĝas la indiko (P) – uzantoj povos sekvi la paŝojn per kiuj oni moviĝas de la baza signifo al parencaj konceptoj.

Uzantoj tuj rimarkos, ke mankas vortoj de la speco "lanta", "povra", "trista" ktp. Ĝenerale mi limiĝis al fundamenta kaj oficiala vortprovizo, uzante neoficialajn vortojn nur se tiuj ŝajnas al mi necesaj aŭ jam tre uzataj. Neoficialaj vortoj estas indikitaj per la simbolo °.

Per ĉi tiu sinonimaro mi esperas montri, interalie, kiom eblas fari per la tradiciaj rimedoj de la lingvo. Ne necesas inventi neologismojn; sufiĉas kree utiligi la sistemon de kunmetaĵoj kaj sufiksoj por transdoni ĉiun nuancon de la emocio aŭ priskribo, kiun oni deziras prezenti al la leganto. Ofte ŝajnas al mi, efektive, ke la emo krei neologismojn montras ian malkapablon manipuli la lingvon; anstataŭ mem krei la vorton por transdoni la deziratan nuancon, oni esperas preni ĝin jam preta el alia lingvo, ne pensante, ke eble tiuj delikataj nuancoj tute ne transdoniĝas al homoj, kiuj ne konas la koncernan lingvon.

Ĉi tiu sinonimaro tre evidente bezonas ankoraŭ amason da laboro: necesas aldoni multajn kapvortojn, foje por tute bazaj konceptoj, kaj kompletigi kaj ordigi la proponojn sub ĉiu kapvorto. Tamen, la sinonimaro jam povas esti utila kaj konsultebla – kiel mi mem utiligis kaj konsultis ĝin dum tradukado de du ampleksaj romanoj Mi invitas uzantojn helpi min per proponado de novaj kapvortoj, novaj proponoj sub ekzistantaj kapvortoj, kaj eventuale ankaŭ per pli sistema kunlaborado por kompletigi kaj ordigi la tuton.

Elŝutita el "http://bonalingvo.net/index.php?title=Sinonimaro_-_Enkonduko&oldid=2962"

---

- Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 18:25, 2 Okt. 2020.

# Sinonimaro - Listo

El La bona lingvo

- reiru al Sinonimaro

---

Por informoj kaj klarigoj pri la Sinonimaro, vidu la Enkondukon.

Por serĉi interne de la Sinonimaro: Ctrl + f (Windows/Linux) aŭ Cmd + f (Mac).

(P) = prilaborota, kompletigota.

° = neoficiala vorto.

**afabla**: ĝentila, agrabla, plaĉa, simpatia, kara, dolĉa, ŝatinda, aminda, helpema, bonvola, bonvolema, kompleza, komplezema, bonkora, varmkora, komprenema, homeca, varma, amika, amikema, gastigema, societema.

**afekta**: afektema, nesincera, malsincera, pretendema, arta, artefarita, nenatura, elpensita, malsimpla, hipokrita, aktora, falsa, ŝajna, ŝajniga.

**agaci**: ĝeni, ĉagreni, kolerigi, inciti, agiti, nervigi, nervozigi, provoki, malkvietigi, maltrankviligi, dolori, inflamigi, turmenti, torturi.

**agado**: aktiveco, vigleco, okupiĝo, ekzerciĝo, intereso, entrepreno, funkciado, plenumo →*ago*

**ago**: faro, faraĵo, farado, agmaniero, agemo, okupiĝo, moviĝado, konduto, manovro, movo, gesto, realigo, efektivigo, plenumo, ekfunkciigo, funkcio, agitiĝo, ekscitiĝo, prezento, procedo, operacio, atingo, heroaĵo, bravaĵo, lertaĵo, sukceso.

**akra**: tranĉa, pinta, pintigita, pika, trapika, penetra, trabora, ponarda, klingosimila, glava, razila, morda, brula, spica, ŝira, grata, skrapa, frota, sega, malglata, raspa, kaŭstika°, dolorega, intensa, akuta, forta, fortega, ekstrema, sagaca, perceptema°, distingema, distingokapabla, precizega, kolera, abrupta, severa, malsimpatia.

**akompani**: kuniri, iri kun, kunvojaĝi, kunveturi, kunesti, eskorti, konduki, gvidi, sekvi, kunludi, kunmuziki, subteni, subteni ludante, harmonii, harmoniigi.

**aktoro**: rolulo, karaktero, ludanto, ludisto, prezentisto, protagonisto, ĉefaktoro, ĉefrolulo, stelulo, komediisto, burleskulo, farsisto, komikisto, tragediisto, ŝajniganto, iluziisto, distristo →*komediisto, prezenti*

**akuzi**: kulpigi, riproĉi, kritiki, mallaŭdi, denunci, raporti, procesi kontraŭ, kalumnii, klaĉi.

**alta**: altega, tureca, montosimila, nubskrapa, ĉielskrapanta, vertikala, elstara, suprenleviĝanta, suprenira, supera, superanta la normalan nivelon, preternorma, eminenta, giganta, monumenta, kolosa, ĝirafa, ĝirafeca, impona, akuta →*granda*

**amaso**: aro, kvanto, kvantego, nombro, abundo, multaj, pli ol sufiĉe, fasko, garbo, monto, monteto, stako°, staplo°, provizo, stoko, kolekto, kunmetiĝo, kunrastaĵo, svarmo →*grupo*

**ami**: amegi, adori, ŝategi, ameti, ŝati, havi korinklinon, senti simpation, deziri, deziregi, amsopiri, senti pasion, pasiiĝi, ardi, bruli por iu, fervori pri iu, esti freneza pri iu, enamiĝi, ekami, enflamiĝi, ekflami pro amo →*amo*, *plaĉi*

**aminda**: ĉarma, plaĉa, kara, dolĉa, agrabla, alloga, dezirinda, karesinda, kisinda, ĝuinda, rava, sorĉa.

**amo**: amego, adoro, adorado, pasio, amdeliro, amekstazo, manio, obsedo°, korinklino, ŝato, simpatio, allogo, deziro, seksa deziro →*ami*

**anonci**: disanonci, reklami, proklami, diskrii, trumpeti, distrumpeti, heroldi, prikrii, elkrii, diskonigi, publikigi, famigi, disfamigi, dissendi, aserti, deklari, deklaracii, sciigi, informi, raporti, eldiri, avizi, signali, malkaŝi, malkovrigi, malsekretigi →*sciigi*

**anticipi**: fruigi, trofruigi, fruiĝi, antaŭtempi, antaŭdati, antaŭsalti, aŭguri, antaŭdiri, signali, antaŭvidi, antaŭimagi, atendi, malhelpi, ensalti.

**anticipo**: antaŭĝuo, antaŭplezuro, antaŭgusto, antaŭimago, antaŭvido, atendo, antaŭatendo, streĉa antaŭatendado, fruigo, fruo, heroldo, antaŭsigno, perspektivo.

**aplaŭdi**: kunfrapi la manojn, klakfrapi la manojn, interfrapi la manojn, aklami, ovacii, hurai, krii ‘bis!’, bisi, kriegi laŭdojn, krii ekstaze, akcepti kun ravitaj krioj, aprobe krii, laŭdi, laŭdegi, gratuli, komplimenti, reagi kun entuziasmo, esprimi admiron, aprobi.

**arbaro**: arbejo, abiaro, kverkaro, arbarego, ĝangalo°, praarbaro, sovaĝejo, natura arbaro, kultivita° arbaro, arbareto, bosko, bosketo, grupo de arboj, arbustaro, arbetaĵo, vepraro°, veprejo°, arbetaĵaro, densejo, marĉarbaro, manglaro°, manglejo°, plantejo.

**arbo**: arbego, arbeto, arbido, arbusto, trunkarbusto, tufarbusto, pinglarbo, ĉiamverda arbo, daŭrafolia arbo, falfolia arbo, abio, acero, banjano°, betulo, cedro, cipreso, eŭkalipto, fago, frakseno, kaŝtanarbo, kaŝtanujo, kverko, lariko, manglo°, palmo, pino, sekvojo°, ulmo, fruktarbo, ĉerizujo, pomujo →*kristnaska arbo*

**aroganta**: malhumila, fiera, fierega, fieraĉa, orgojla°, malmodesta, tro memfida, memŝata, memŝatema, ŝvelkapa, konvinkita pri sia propra valoro, sin glorigema, kun tro alta opinio pri si mem, pretendema, supereca, fanfaronema, paradema, paveca, snoba°, impertinenta, malĝentila, ofendema, trudema, trudiĝema, asertema, malestima, malrespekta.

**artefarita**: arta, nenatura, homfarita, fabrikita, kreita, projektita, planita, elpensita, ellaborita, kunmetita, sintezita, sinteza, inventita, ŝajnigita, artifika, imita, plasta, ŝajna, falsa, trompa, nesincera, afekta, hipokrita, malnaiva.

**atenti**: aŭskulti, rigardi, koncentriĝi, dediĉi atenton, doni atenton, direkti sian atenton, priatenti, doni sian menson, konscii, kontroli, konsideri, rimarki, interesiĝi, zorgi pri, strebi, prudenti, vigli.

**atingi**: kuratingi, alveni, aliri, ĝisiri, trafi, tuŝi, sukcesi, kapti, akiri, etendiĝi ĝis, ampleksi, renkonti, preterpasi, ĝisvivi, ĝisstrebi, ĝisbatali, kontakti, alparoli, komuniki kun.

**avara**: monavida, ŝparema, malelspezema, neaĉetema, atenta pri sia mono, zorga, modera, singarda, rezervema, maldonema, maldonacema, posedema, retenema, kolektema, akirema, kaptema, kalkulema, egoisma.

**avida**: posedema, avara, deziremа, soifa, malsatega, arda, pasia, fervora, fanatika, senbrida, senretena, neretenebla, neregebla, malpacienca, entuziasma, voluptavida, volupta, voluptema, streba, strebanta, aspiranta, sopiranta, ambicia.

**balanci**: balanceti, ritme movi, ondigi, svingi, eksvingi, skui, agiti, kapjesi, kapnei, levi-mallevi, luli, tremigi, vibrigi, ŝanceli, saltigi.

**balanciĝi**: baskuli, sin skui, skuiĝi, svingiĝi, oscili°, pendoli, tiktaki, zigzagi, ondi, ondadi, ondiĝadi, serpentumi, tremi, tremeti, vibri, danci, salteti, ŝanceliĝi, konvulsii.

**banala**: ordinara, normala, maloriginala, malsprita, senspica, senekscita, neekscita, seninteresa, malinteresa, teda, kliŝa, ŝablona°, rutina, tipa, stereotipa, regurdita, sensignifa, neaparta, nespeciala, nerimarkinda, nedistingita, neatentinda, komuna, komunuza, ĝenerale uzata, triviala, kutima, ĉiutaga, vulgara.

**barilo**: baro, baraĵo, obstaklo, malhelpaĵo, barikado, blokaĵo, malhelpo, malfacilaĵo, ŝtopilo, balustrado, apogrelo, apogilo, manrelo, gardrelo, palisaro, muro, remparo, limo, vendeja barilo, vendobarilo, servobarilo, vendotablo, giĉeto, servejo.

**batali**: militi, malpaci, konflikti, disputi, kverelegi, ataki, agresi, sturmi°, perforti, lukti, strebi, barakti, interbatiĝi, boksi, pugni, skermi, dueli, kontraŭstari, defendi, fronti, oponi, opozicii, rezisti, malcedi, defii, venki, konkeri, triumfi, draŝi, malvenki, malkonkeri, maltriumfi, konkuri, konkursi.

**bati**: frapi, trafi, frapegi, trafegi, tuŝegi, ektuŝegi, bastoni, vipi, vergi, skurĝi, draŝi, punbati, doni batregalon, regali iun per batoj, tani al iu la haŭton, varmigi ies postaĵon, manbati, piedbati, vangofrapi, pugni, boksi, batmiksi, kirli, pisti, dispremi, sonigi, sonorigi, soni, tamburi, marteli, pulsi, sonori, puni, plagi, suferigi, kontuzigi.

**bedaŭri**: domaĝi, ĉagreniĝi, afliktiĝi, indigni, penti, pardonpeti, esprimi bedaŭron, kompati, kondolenci, lamenti, vei, veadi, priplori, funebri, malvolonte fari, malbonvole fari, malĝoji, esti malkontenta, seniluziiĝi.

**bedaŭrinda**: kompatinda, priplorinda, malfeliĉa, malbonŝanca, malfavora, fatala, malbonaŭgura, misaŭgura.

**bedaŭrinde**: ve!, domaĝe, malĝuste, maljuste, skandale, hontinde, kia honto!

**bedaŭro**: pento, kulposento, konsciencoriproĉo, pardonpeto, kondolenco, ĉagreno, afliktiĝo, malĝojo, kordoloro, malkontento, malplezuro, seniluziiĝo, elreviĝo.

**bela**: belega, rava, glora, beleta, ĉarma, plaĉa, agrabla, alloga, plezuriga, kontentiga, rigardinda, pentrinda, perfekta, senmanka, belforma, belfigura, belvizaĝa, belaspekta, plaĉaspekta, gracia, harmonia, delikata, eleganta, impona, mirinda, admirinda, elstara, okulfrapa, belsona, melodia →*plaĉa*, *impona*

**beni**: favoradi, bonaŭguri, bondeziri, alvoki dian favoron, inviti dian komplezon, doni, feliĉigi, sukcesigi, fekundigi°, danki, laŭdi, adori, honori, sanktigi, glorigi.

**bloko**: maso, amaso, masivo, solidaĵo, pezaĵo, tutaĵo, kunaĵo, peco, pecego, bulo, lignobloko, lignopecego, lignaĵego, ŝtipo, stumpo, tabulo, trabo, ŝtonbloko, kolono, blokiĝo, blokaĵo, baraĵo, barilo, ŝtopaĵo, ŝtopilo, malhelpo, obstaklo, obstrukco, bojkoto, sieĝo, alianco°, unuiĝo, akso, trafikbloko, trafikvico, ŝtopiĝo.

**bona**: virta, pia, bonmora, morala, sankta, honesta, sincera, justa, perfekta, ideala, pura, senmanka, altkvalita, admirinda, estiminda, respektinda, inda, merita, bonkonduta, obeema, sindona, sindonema, akceptebla, kontentiga, sufiĉa, agrabla, plaĉa, elstara, avantaĝa, profita, profitdona, utila, helpema, sana, saniga, nova, freŝa, bongusta, favora, taŭga, ĝusta, oportuna, konvena, kapabla, kompetenta, lerta, sperta, brava, sukcesa, eminenta, talenta, afabla, ĝentila, bonkora, bonvola, bonvolema, komplezema, bonŝanca, fidinda, sekura, bela, granda, abunda →*afabla*, *bongusta*, *taŭga*

**bongusta**: frandinda, manĝinda, gustoplena, gustohava, dolĉa, sukera, krema, spica, spicita, freŝa, delikata, subtilgusta, rafinita, riĉa, ambrozia, bone kuirita, perfekte kuirita, apetita, apetitveka, plaĉa, plezuriga, ĝuinda.

**bonŝanca**: favora, avantaĝa, oportuna, konvena, feliĉa, laŭ feliĉa hazardo, bonfortuna°, benata de la Fortuno°, benita, bonsorta, bonaŭgura, prospera, sukcesa, dezirata.

**brila**: brilanta, hela, arda, glima, intensa, blindiga, fajra, fulma, vigla, luma, klara, flagra, trembrila, ŝanĝbrila, glora, pompa, elstara, lerta →*elstara*

**brili**: brileti, lumi, radii, lumigi, heligi, ardi, glimi, bruli, flami, flagri, flagreti, trembrili, fulmi, blindigi.

**broĉo**: fibulo°, fibolo°, pinglo, fermilo, fiksilo, buko, agrafo, ornamaĵo, juvelo, gemo, diamanto, brilianto, rubeno, smeraldo, perlo →*juvelo*

**brua**: laŭta, orelŝira, akuta, orelĝena, orelrompa, oreldolora, surdiga, akrasona, misharmonia, tumulta, eksploda, sensacia, konfuza, kriema, krianta.

**brui** →*soni*, *laŭta*

**bruli**: ekbruli, bruliĝi, brulegi, flami, ekflami, flamiĝi, fajri, subbruli, bruleti, ardi, forbruli, cindriĝi, karbiĝi, flagri, flagreti, fajreri, fulmi, fulmeti, boli, kuiriĝi, varmigi, hejti, lumi, lumigi →*fajro*

**bruligi**: fajrigi, flamigi, forbruligi, detrui, konsumi, cindrigi, karbigi, nigrigi, fandi, kuiri, rosti, baki, boligi, brogi, brulvundi, hejti, lumigi →*detrui*, *kuiri*

**buŝo**: buŝkavo, buŝego, buŝeto, lipoj, lango, makzeloj, buŝaĉo, manĝotruo, maĉaparato, manĝorgano, suĉorgano, faŭko, beko, malfermaĵo, truo, luko, aperturo, enirejo, giĉeto, klapo.

**cedi**: fleksiĝi, moliĝi, ne plu elteni, ne rezisti, enfali, ne plu kontraŭbatali, kapitulaci, submetiĝi, abdiki,sin fordoni, (sin) allasi, (malvolonte) konsenti, permesi, transdoni, koncesii, rezigni, rezignacii, (rezignacie) akcepti, toleri.

**celo**: intenco, deziro, aspiro, ambicio, plano, projekto, programo, strebo, klopodo, peno, sopiro, fervoro, ardo, avido, avideco.

**certa**: certega, nedubebla, eksterduba, senduba, eksterdemanda, nekontraŭstarebla, nepra, absoluta, senkondiĉa, klara, evidenta, stabila, konstanta, neevitebla, fiksita, antaŭfiksita, determinita, difinita, fidinda, dependebla, memcerta, memfida, fida, firma, nedubanta, senhezita, konvinkita, senrezerva, aparta, preciza, specifa.

**ĉagreni**: aflikti, malĝojigi, malfeliĉigi, melankoliigi, malplezurigi, malkontentigi, inciti, zorgigi, maltrankviligi, malkvietigi, ĝeni, suferigi, plorigi, deprimi, dolori, vundi, agiti, perturbi°, konfuzi, skui, domaĝi, detrui.

(P) **ĉarma**: alloga, nerezistebla, sorĉa, rava, frandinda, fascina, plaĉa, aminda, dezirinda, magia.

(P) **ĉefo**: tribestro, popolestro, vilaĝestro, estro, gvidanto, reĝo, moŝto.

(P) **ĉiel**: ĉiurimede, ĉiumaniere, senbride, fervore →*senbrida*

**ĉirkaŭaĵo**: medio, vivmedio, agadkampo, vivloko, ejo, loko, troviĝejo, ĉeestejo, estejo, zono, spaco, regiono, kvartalo, proksimeco, apudeco, loĝloko, loĝejo, loĝadejo, restadejo, hejmo, fono →*loko*, *tereno*, *loĝejo*

(P) **danĝero**: minaco, risko, maltrankvilo, malico, malbono, malfeliĉo, mortebleco.

(P) **deca**: morala, altmorala, admirinda.

(P) **decidi**: solvi, difini, decidiĝi, preni decidon, elekti, fiksi, aranĝi, meti finon al demando.

(P) **dediĉi**: fordoni, oferi.

(P) **delikata**: subtila, maldika, malgranda, nuancigita, malfacile kaptebla, malkruda, milda, diafana.

(P) **densa**: abunda, riĉa, koncentrita, nepenetrebla, kunpremita, ŝtopita, diafana, netravidebla, dika.

(P) **dense**: proksime.

(P) **denunci**: malkaŝi, informi, sciigi, disbabili, perfidi, senmaskigi.

(P) **detrui**: malkonstrui, ruinigi, pereigi, neniigi, nuligi, ekstermi, forigi, faligi, renversi, polvigi, cindrigi, rompi, frakasi, abolicii, forstreki, forviŝi, disbati, konsumi, forbalai, mortigi, estingi.

(P) **detruo**

(P) **devigi**: insisti, trudi, urĝi, zorgi ke, nepri, nepre farigi, perforti.

(P) **devojiĝo**

(P) **deziri**: aspiri, avidi, ambicii, strebi, sopiri, entuziasmi, fervori, celi.

(P) **diablo**

(P) **difekti**: fuŝi, detrui, malbonigi, kripli, subfosi, malbeligi, mistrakti, misigi, rompi, ŝiri, vundi, malhelpi, malsukcesigi, faligi.

(P) **difekto**: miso, misaĵo, malbono, malutilo, malprofito, vundo, mistraktado, kripligo, subfoso, fuŝo.

(P) **digna**: respektinda, severmora, formala.

(P) **dika**: grasa, peza, solida, grasdika, karnodika, densa, ŝvelronda, ronda, pufa, bone remburita, elefanta, graspufeta, ŝvelplena, dikventra, grasremburita, karnohava, karnoplena, bone nutrita.

(P) **dia**: dieca, disimila, senmortula, ĉiopova, supernatura, superhoma, spirita, anĝela, ĉiela, mistika, sankta, religia, ekstaza, paradiza, didonita.

(P) **dio**: nemortemulo, senmortulo, spirito, Ĉiupovulo, idolo, la Sinjoro, la Kreinto, Patro Nia, diaĵo.

(P) **diri** →*paroli*

**dolori**: dolaraĉi, ĝeni, turmenti, torturi, ĝemigi, plorigi, suferigi, plendigi, aflikti, ĉagreni, senti/kaŭzi angoron, mordi, piki, vundi, ofendi, humiligi.

**doloro**: ĝeno, suferado, turmento, torturo, malkomforto, malagrabla sento, kapdoloro, kordoloro, brustangoro, spasmo, peno, malĝojo, aflikto, angoro, ĉagreno, piko, mordo, mizero.

(P) **domo** →*loĝejo*

(P) **doni**: donaci, disponigi, havigi, enmanigi, pasigi, transdoni, proponi, ofterti, disdoni, provizi.

(P) **dormi**: endormiĝi, ekdormi, dormeti, sterniĝi, ripozi, kuŝi, ronki, sonĝi.

(P) **dungi**: postenigi, laborigi, komisii, elekti, enoficigi, taskigi, lui, varbi, mendi.

(P) **egoisma**: egocentra, malaltruisma°, memcentra, avida, avara, sinadmiranta, narcisisma°.

(P) **ekscita**: sensacia, inspira.

(P) **ekscitata**: fervora, fajra, pasia, febra, entuziasma, arda, elkora, fanatika, viva, verva, vigla, senspira.

(P) **eksciti**: intensigi, stimuli, vigligi, instigi, akceli, flamigi, aktivigi, entuziasmigi, vivigi, ekvivigi, senspirigi.

(P) **eksiĝi**: demisii.

(P) **eksmoda**: malnovmoda, malmoderna, malaktuala, mezepoka, praepoka, praa, tradiciema, tradicia, eksstila, malnovastila.

(P) **ekstere**: en la libera aero, subĉiele, substele, sub la nuboj, sub la pluvo, sen ŝirmejo, senprotekte.

(P) **ekzameni**: zorgeme rigardi, detale esplori, inspekti, priserĉi, kontroli, revizii, superrigardi, observi.

(P) **ekzerciĝi**: ripeti, reprovi, perfektigi, ripetadi, plibonigi, lertiĝi.

(P) **ekzisto**

(P) **eleganta**: luksa, laŭmoda, moda, rafinita, gustoplena, multekosta, pompa, brila, admirinda, delikata, polurita, impona, ornama, grandioza, belforma.

(P) **eliri**: disiri, foriri, moviĝi eksteren, malaperi, pasi, eliĝi, elverŝiĝi, fuĝi, eskapi, disiĝi, elpaŝi, amuziĝi, ditriĝi, festi.

(P) **elstara**: brila, okulfrapa, neforgesebla, admirinda, mirinda, miriga, senspiriga, spirhaltiga, eksterordinara, imponega, notinda, eminenta, glora.

(P) **entuziasma**: fervora, arda, energia, ataka, febra, pasia, fanatika, freneza, avida, ekscitata, varma, mania, plenkora, vigla →*senbrida*

(P) **entuziasmo**: fervoro, ekzalto, energio, ardo, pasio, flamo, frenezeco, avido, ekscito, manio.

(P) **esprimo**: rigardo, aspekto, mieno, trajtoj, vizaĝo.

(P) **estiminda**

(P) **facila**: senpena.

(P) **fajro**: varmo, brulo, ardo, flamo, fajrero, fajrego, torĉo, brilo, lumigilo, varmego, hejtmaterialo, brulligno, brulo, brulego, fulgo, cindroj →*bruli*

(P) **fali**: falegi, malleviĝi, gliti al la planko, sveni, velki, surgrundiĝi, plonĝi, ĵetiĝi malsupren, kolapsi, cedi.

(P) **falsa**: ŝajna, trompa, nevera, malvera, nesincera, nereala, mensoga →*artefarita*

(P) **fanatikulo**: subtenanto, entuziasmulo, fervorulo, favoranto, pasiulo, ekstremisto, fundamentisto.

(P) **fantazio**: fantaziaĵo, iluzio, revo, utopio, ĥimero, aera kastelo, deliro, deliraĵo.

**fekunda°**: fruktoriĉa, fruktodona, produktema, naskema, naskipova, grasa, riĉa, verda, abunda, prospera.

(P) **feliĉa**: kontenta, ĝoja, bonhumora, petola, ridema, ridetanta, gaja, ĝojplena, ekstaza.

(P) **fermi**: sigelfermi, ŝlosi, ŝtopi, plenigi, bloki, bari.

**festi**: soleni, celebri°, honori, glori, amuziĝi, ĝoji, festeni, bankedi°, laŭdi, aplaŭdi, tosti, proklami.

**festo**: ceremonio, solenaĵo, rito, festivalo°, ĝoja okazo, amuza vespero, amuzaĵo, amuziĝo, jubileo, datreveno, naskiĝtago, festeno, bankedo°, tosto, karnavalo.

(P) **fiera**: ŝvelkapa, singloriga.

(P) **flago**: standardo, simbolo, blazono, insigno, emblemo, tuko.

(P) **flegi**: prizorgi, kovi, atenti pri, eduki, kreskigi, kuraci.

(P) **florkrono**: girlando, festono.

(P) **flui**: flueti, fluegi, guti, liki, cirkuli, moviĝi, verŝiĝi, inundi.

(P) **flustri**: murmuri, susuri, zumi, diri mallaŭte, elspiri, spiri, murmureti, brueti, paroli subvoĉe.

(P) **forkuri**: fuĝi, eskapi, liberiĝi.

(P) **forlasi**: rezigni pri, demeti, ne plu okupiĝi pri, foriri de, lasi sola, postrestigi, meti flanken, forigi.

(P) **formala**: laŭkutima, laŭregula, konvena, deca, preciza, ceremonia, konvencia, solena.

(P) **formo**: aranĝo, strukturo, figuro.

(P) **forta**: potenca, firma, intensa, fortika, arda, pasia, fervora.

(P) **forviŝi**: nuligi, forigi.

(P) **fosaĵo**: kavaĵo, profundaĵo, tranĉeo.

(P) **freneza**: malprudenta, furioza, neregebla, nebridebla, histeria, mense malsana, sensenca, malsaĝega, mania, ebria, sovaĝa, ekscitata, pasia, delira, ekstaza.

(P) **froti**: skrapi, raspi, grati, karesi.

(P) **furioza**: malprudenta, kolerega, perforta, senbrida, ŝtorma, freneza, nehaltigebla, senlima, senespera.

(P) **gaja**

(P) **gajigi**: forigi ies deprimon, distri, konsoli, sekigi la okulojn, regajigi.

(P) **gajiĝi**: retrovi la bonan humoron, regajiĝi, retrovi la vivoĝojon, maldeprimiĝi.

(P) **gesto**: moviĝo, movo, indiko, esprimo, mieno, signo, svingo, mansvingo, kapsigno.

(P) **glata**: glita, glitiga, glacia, facile irebla, trankvila, senbara, sen elstaraĵoj, facila, ebena, plata, uniforma, regula, brila, vitreca, silka, polurita, lakita, flua, olea, grasa, senobstakla.

(P) **gluti**: engorgiĝi

(P) **gramatiko**: a-vorto, a-finaĵo, ablativo

**granda**: larĝa, vasta, grandega, giganta, kolosa, monumenta, grandioza, impona, titana, elefanta, mamuta, ŝvelinta, tro kreskinta, superkreskinta, supermezura, troa, troigita, dika, grasa, ampleksa, spacohava →*impona*

(P) **grava**: serioza, solena, peza, profonda, atentinda.

(P) **grupo (de homoj)**: aro, rondo, amaso, bando, irantaro, grupaĉo, bandaĉo, fiularo, kanajlaro, hordo, trupo, taĉmento, roto, kompanio, kuniĝo, kunularo, akompanantaro, teamo, svarmo, kunpuŝiĝo, homamaso, asembleo, homgrupo →*homamaso*

(P) **gvidi**: montri la vojon, konduki, irigi, akompani, direkti, stiri, estri, sciigi, orienti, porti, antaŭeniri, venigi, alvenigi.

(P) **ĝemi**: ve-spiri, elspiri, laŭte elspiri, spirsingulti, anheli°.

(P) **ĝeni**: insidi, inciti, mistrakti.

(P) **ĝentila**: afabla, kavalireca, korteganeca, nobla, nobela.

(P) **ĝojo**: plezuro, feliĉo, ĝuo, gajeco, kontentego, ebria feliĉo, perfekta feliĉo.

(P) **ĝui**

(P) **hara**: harkovrita, vila, hareca, longhara.

(P) **haroj**: hararo, frizaĵo, buklaro, felo, elkreskaĵoj, hartufoj, hararanĝo, vilo.

(P) **havaĵo**: utilaĵo, avantaĝo, rimedo, posedaĵo, propraĵo, apartenaĵo, uzaĵo, materialo, akiraĵo.

(P) **helpanto**: prizorganto, akceptisto, gardisto, pordisto, asistanto, kontrolisto, sub-, vic-, servisto, komizo, gvidisto, stevardo, intendanto, oficisto, mastrumanto, administranto, pedalo, subulo, viculo.

(P) **heziti**: esti malcerta, ŝanĉeliĝi, dubi, esti nedecidema, konfuziĝi, malentuziasmi, esti malfirma.

(P) **homamaso**: svarmo, homsvarmo, konfuzo, amaso, kunpremiĝo, popolo, publiko, homoj, spektantaro, rigardantaro, vicoj, vicaro, kunularo, grupo, grupego, tumulto, loĝantaro →*grupo (de homoj)*

(P) **honesta**: fidinda, merita, sincera, honorinda.

(P) **honti**: malhonoriĝi, malgloriĝi, senti pudoron, malrespektiĝi, geniĝi, konfuziĝi, embarasiĝi, afliktiĝi, humiliĝi, malaltiĝi, enmarĉiĝi, vadi en abismo de honto.

(P) **humila**: ŝafa, ŝafeca, malribelema, malfiera, submetiĝema, obeema, malestimata, malalta, senpretenda, senaŭtoritata.

(P) **humiligi**: embarasi, subpremi, ofendi, piedpremi, devigi iun leki ies piedojn/pugon surgenuigi.

(P) **humoro**: animstato, gajeco, acidemo, maltrankvilo ktp., mensostato.

(P) **implikiĝi** →*resti*

(P) **impona**: elstara, grandioza, belega, pompa, majesta, solena, okulfrapa, brila, glora, miriga, admirinda.

(P) **inciti**: inciteti, turmenteti, moki, eksciti, pikmoki, piketi, defii, ĉagreni, spiti, provoki, ŝerce ataketi, agaci, ĝeni.

(P) **indiferenta**: apatia, seninteresa, senpartia, malvarma, glacia, flegma, senemocia, sen fortaj preferoj, ne interesata, sen ekscito, malentuziasma, neekscitiĝema, senzorga, senĝena.

(P) **indigno**: kolero, malpardonemo.

(P) **infero**: abismo.

(P) **insekto**: abelo.

(P) **inspekti**: ekzameni, kontroli, superrigardi, esplori, observi.

(P) **instigi**: admoni, sproni, kuraĝigi, premi, puŝi, stimuli, inspiri, peli, devigi, igi, insisti.

(P) **insulti**: ofendi, riproĉi, humiligi, misprezenti, misfamigi, malestimi, vundi, malrespekti, skandaligi, indignigi, malhonorigi.

(P) **inteligenta**: lerta, klera, prudenta, saĝa, sagaca, brilmensa, brila, rapidmensa, vigle pensanta, rapidpensa, klarmensa, kapabla, edukita, instruita, talenta, genia, elstara.

(P) **intenci**: voli, celi, plani, projekti, proponi, ambicii, aspiri, deziri, strebi, esti konvinkita pri.

(P) **interesi**: okupi la menson, koncerni, kapti/teni la atenton, plenigi la pensojn, (al)logi, voki, veki la atenton/scivolon.

(P) **intereso**: pasio, obsedo, okupiĝo, utilo, profito, scivolo, atento, koncerno, zorgo, graveco, sekvo, allogo, logeco, altiriĝo, kuriozeco.

(P) **interno**

(P) **inundo**: torento, fluego, verŝaĵo, ŝprucaĵo, elŝprucaĵo, ondego, lavango, pluvego, superverŝo, superfluo, superbordiĝo, akvego, hajlo.

(P) **inviti**: venigi, gastigi, mendi, alvoki.

(P) **iri**: marŝi, promeni, direktiĝi al, moviĝi, paŝi, kuri, flugi, rajdi, veturi, paŝadi, ekskursi, vagi, vojaĝi, migri, sekvi sian vojon, antaŭeniri, flui, ruliĝi, pasi, anaspaŝi, troti, paradi, direkti sin, turni sin, ŝteliĝi, vojiri, ŝtelpaŝi, krabpaŝi.

(P) **juna**: freŝa, nova, nematura, verda, infana, infaneca, beba, bebeca, malgranda, frua.

(P) **juvelo**: juvelŝtono, ornamaĵo, gemo, diamanto, rubeno, smeraldo, perlo, brilianto, broĉo, kolĉeno, brakringo, ringo, orelringo, braceleto *→broĉo*

(P) **kaduka**: malfortika, malnova, malnoviĝinta, velka, malforta, maljuna, kripla, malfirma, nesekura, finiĝonta, mallonge daŭra, maldaŭra, fiaskonta, kliniĝanta, malstabila, misformita, rompita, frakasita, ruina.

(P) **kalkulado**

(P) **kalkulilo**: abako

(P) **kampo**: loko

(P) **kanti**: aŭdigi sian voĉon

(P) **kanto**: himno, dankokanto, glorkanto, lulkanto, ĝojkanto, plorkanto, popolkanto, solkanto, sorĉkanto, tremkanto, ario, dueto, komponaĵo, melodio, harmonio, triumfa kanto, solena kanto, operero, operaĵo.

(P) **kapti**: preni, subite preni, rapide preni, ekposedi, rabi, firme teni, teni, trafi, akapari, forrabi.

**kaŝi**: ne mencii, ne esprimi, intence ne diskuti, prisilenti, forsilenti, preterlasi, ellasi, salti, lasi neesprimita, kovri, maski, vuali, subpremi, sufoki, enterigi, subtabligi, ŝlosi, forŝlosi, ignori, sekreti, malaperigi, mensogi, hipokriti.

(P) **kavo**

(P) **klara**: pura, malkonfuza, facile distingebla, preciza, neta, komprenebla, divenebla, senduba, nedubebla, travidebla, hela, kristala, evidenta, memevidenta.

(P) **klariga**: ilustra

(P) **kolera**: bolanta, furioza, kolerika, senbrida, freneza, malkvieta, malpacema, kverelema, sovaĝa, senpacienca, ardanta, febra, pasia.

**komediisto**: komikisto, burleskulo, farsisto, arlekeno, klaŭno°, distristo *→aktoro*

(P) **komenci**: ek-, ekfari, ekigi, eki, malfermi, alpaŝi al, veki, inaŭguri, instigi, fondi.

(P) **kompleta**: perfekta, plena, senmanka, sufiĉa, sentrua.

(P) **komplete**: tute, absolute, perfekte, plene.

(P) **komploto**: konspiro, politika mortigo/murdo, atenco, krimo.

(P) **kompreni**: kapti la sencon, kapti la signifon, havi ĝustan ideon pri, klarigi al si, havi scion pri, akiri scion pri, informiĝi pri, malvolvi, malplekti.

(P) **koncerni**: rilati al, tuŝi, interesi, trafi.

(P) **konduto**: estomaniero, sinteno, traktado, agomaniero, esteco, maniero, agospeco, agado, kutimo, teniĝo.

(P) **konfuzo**: malordo, intermiksaĵo, embaraso, konsterno, perturbo, spirita/mensa malklareco, nebulo, maltrankvilo, sen aplombo, dubo, ŝanceliĝemo, tohuvabohuo.

(P) **konfuzi**: konsterni, ŝoki, senspirigi →*konsterni*

(P) **konsilo**: sugesto, propono, helpideo, admono, averto.

(P) **konsternita**: ŝokita, mirigita, konfuzita, timigita, ĉagrenita, trafita, ĝenata.

(P) **konstrui** →*krei*

(P) **kontenta**: kontentega, kontenteta, ĝoja, ĝojplena, ravita, entuziasma, feliĉa.

(P) **kontraŭstari**: kontraŭi, malakordiĝi, malkunlabori, kolizii, konflikti, malkonsenti, rezisti, malcedi, opozicii.

(P) **konvinki**: instigi, kredigi, stimuli, puŝi, inviti, inklinigi, inspiri, impulsi, decidigi.

(P) **krei**: fari, verki, ellabori, fondi, organizi, estigi, establi, funkciigi, starigi, loki, instali, aranĝi, konstrui, evoluigi, kunmeti, komponi, kombini.

(P) **kreski**: plenkreski, maturiĝi, edukiĝi, disvoliĝi, evolui, grandiĝi, plimultiĝi, multiĝi, altiĝi, vastiĝi, intensiĝi, fortiĝi, ampleksiĝi, leviĝi, naskiĝi, ĝermi, plenaĝiĝi, ŝveli.

(P) **kreskigi**: kultivi, bredi, vivteni, eduki, prizorgi, flegi, varti, grandigi, forci°, kulturi, bredi, reprodukti, teni, evoluigi, formi, instrui, gardi.

(P) **krii**: kriegi, ŝirkrii, voki, laŭtigi la voĉon, akre krii, bleki, ŝiri la aeron per siaj krioj, eligi ŝirajn kriojn, tondri, krii per tondra voĉo, ŝiri al iu la orelojn, muĝi, kriaĉi, proklami, distrumpeti.

(P) **krimulo**: ŝtelisto, rabisto, murdisto, murdinto, bandito, gangstero, malliberulo, mortigisto, ŝarko.

(P) **kristnaska arbo**: kristnaskarbo, kristarbo, festa arbo, abio, piceo, pinglarbo →*arbo*, *kristnasko*

(P) **kristnasko**

(P) **kuiri**: kunmiksi, prepari, pretigi, kombini, baki, friti, boligi, rosti, kradrosti, enfornigi.

(P) **kulmino**: supro, pinto, verto, kresto, plej alta grado, ekstremo, plej elstara momento, apogeo, zenito, paroksismo, plej intensa momento, egeco.

(P) **kunigi**: kunpeli, kolekti, kunrasti, kolekti.

(P) **kunsento**: kompato, kondolenco, bedaŭro, simpatio, komuna (mal)ĝojo, kortuŝiĝo.

(P) **kunulo**: parulo, kunludanto, kunlaboranto, kamarado, kolego, frat(in)o, intimulo, amik(in)o, samideano, kompaniano.

(P) **kuri**: moviĝi rapide, troti, galopi, urĝiĝi, flugi, rapidi, kuregi, iregi, impeti, svingi sin, paŝegi, kuri senbride/nehaltigeble, hasti, fulmi, fuĝi →*rapidi*

(P) **kvereli**: disputi, malpaciĝi, malinterkonsenti, interkrii, protesti, fari problemojn, kontraŭargumenti, malkonsenti, polemiki.

(P) **kverelo**: malharmonio, malakordo, malkonkordo.

(P) **laboro**: penado, klopodo, fortostreĉo, tasko, okupo, ofico, dungiteco, profesio, metio, kariero, pozicio, rolo, funkcio, fako, devo, servo, posteno.

(P) **lako**: gumo, rezino, verniso, solvaĵo, ŝelako, gluo, gluaĵo, ŝmiraĵo.

(P) **lamenti**: vekrii, plorkrii, plendi, ĝemi, ploregi, funebri, esprimi sian aflikton, esprimi kordoloron, vespiri, suspiri.

(P) **larĝa**: vasta, libera, senlima, malfermita, ampleksa, spacohavo, spacoplena.

(P) **lasta**: fina, konkluda, posta, ĵusa, restanta, sola restinta, plej malgrava, malplej alta, malplej atentinda.

(P) **laŭta**: aŭdebla, klare aŭdebla, tro aŭdebla, brua, alta, emfaza, tondra, resona, sonora, surdiga, forta, fortega, muĝa, kria, orelŝira, orelrompa, bruega, altega, klara, vibra, tambura →*soni*, *brui*, *malplaĉa*

(P) **laŭtlegi**: voĉlegi, deklami, paroladi.

(P) **lerni**: studi, instruiĝi, trejniĝi, lertiĝi, plilertiĝi, sekvi kurson, ekzerciĝi, akiri sciojn, diligenti, legi, enkapigi, akiri, parkerigi.

(P) **lerta**: inteligenta, altkvalita, talenta, elstara.

(P) **lerte**: majstre.

(P) **linio**: streko, kontinua aro, konturo, limo, vico, serio, kolumno, strio, bendo, rando.

(P) **liveri** →*provizi*

(P) **loĝejo**: domo, dometo, kabano, barako, budo, konstruaĵo, hejmo, branĉ-kabano, ter-kabano, apartamento, domaro, domego, apartamentaro, apartamentodomo.

